

Eklipso de la suno

La 11-an de aŭgusto 1999 okazos plena eklipso de la suno, kiu estos videbla en strio trapasanta Eŭropon, Turkion, Iranon kaj Hindion. Plena eklipso de la suno estas impona spektaklo: dum 2 minutoj la luno komplete kovras la sunon kaj ĉio fariĝas malhela, proksimume same malhela kiel dum lunbrila nokto.

La eklipso estos videbla kiel parta eklipso en la tuta Eŭropo kaj grandaj partoj de Afriko kaj Azio. Tamen plena eklipso estas io tute alia ol parta eklipso: dum parta eklipso oni povas rimarki nur ioman malheliĝon de la taga lumo.

La plena fazo estos videbla nur en strio proksimume 110 kilometrojn larĝa (maksimume 112,3 km). Ĝi unue tuŝos Eŭropon en Kornvalo, trairos nordan Francion, sudan Germanion, poste Aŭstrion, Hungarion kaj Rumanion, transsaltos la Nigran maron kaj traĉasos Turkion, Iranon, Pakistanon kaj Hindion. La daŭro de la plena fazo estos proksimume du minutoj, kun maksimumo de 142,4 sekundoj okazonta en Rumanio.

En la komenco de la plena fazo oni povas vidi la ombron de la luno rapidege alproksimiĝi. La birdoj ĉesas kanti, ĉar ili ja kredas ke noktiĝos; la tuta naturo preparas sin por nokto, kiu tamen ne estos longa. Poste, se ne estas nuboj, oni vidas la stelojn kiel dum lunnokto kaj la koronon de la suno, kiu konsistas el varmega plasmato kaj elradias palan lumon. La korono aspektas alie de unu eklipso al alia: ĝi povas esti pli aŭ malpli granda, enhavi diversajn radiojn kaj striojn.

Nu, nuboj... se estas nube, oni ja ne povas vidi la koronon nek stelojn; oni nur rimarkas la malheliĝon. Pro tio indas serĉi lokon kun la plej granda ŝanco de klara ĉielo. La probablo de sennuba ĉielo ĉi-foje estos plej granda en Turkio kaj Irano. En Eŭropo la plej granda ŝanco vidi la eklipson estos ĉe la marbordo de la Nigra maro en nordorienta Bulgario; eble ankaŭ la lago Balaton estos iom pli feliĉa ol la cetero de la centra Eŭropo.

Serĉu mapojn kaj pliajn informojn ĉe:

<http://umbra.nascom.nasa.gov/eclipse/990811/rp.html>

<http://sunearth.gsfc.nasa.gov/eclipse/TSE1999/TSE1999.html>

Christer Kiselman